

## *La Sublima Historio de la Budhoj*

Mahapadana Suto (Digha Nikajo 14)

大譬喻經

tradukis **Geo Yoxon**, Britio

La Altestimato foje restis ĉe Savathio, de la dometo de la Kapario-arbo (Capparis-trifoliata), en la Arbaro Ĝeto, donacita al li kaj la Ordeno de Anatho Pindiko. La interparolado inter la multaj sanghanoj kiuj, akompanantaj lin, restis ĉe la pavilono tie, okaze temis pri antaŭaj vivoj. Kiam li sciiĝis pri tiu ĉi interparolado, la Altestimato leviĝis kaj iris al la pavilono kaj tie eksidis sur tapiŝo sternita preta por li. Kiam ili informis lin pri la temo diskutata, li proponis, ke li parolu al ili pri ĝi. La propono estis entuziasme akceptita.

"Pasis jam 91 eraoj," diris la Altestimato, "de kiam la Budho Vipaso aperis en la mondo. Pasis jam 31 eraoj de kiam naskiĝis la Budho Sikhi, kaj en la sama erao vivis la Budho Vesabhu. En tiu ĉi nuna erao tri Budhoj jam aperis en la mondo antaŭ mia naskiĝo, nome la Budhoj Kakusandho, Konagamano kaj Kasapo," kaj li rakontis la detalojn pri la gepatroj kaj la ĉefaj disĉiploj de ĉiuj el tiuj Budhoj.

Post lia foriro la fratoj diris unu al la alia, "kiel mirinde, kiel eksterordinara estas la majstra menso de la Tathagato, tiel ke li povas memori la Budhojn de la antikva pasinteco, kiuj atingis la finan celon, kiuj forigis malhelpaĵojn, kiuj forhakis barojn, kiuj ĉesigis la rondiradon, kiuj sukcesis forlasi ĉian suferadon. "Kion vi opinias," diris unuj al aliaj, "ĉu ĉion ĉi la Tathagato mem perceptas, tiel ke, per sia percepto pri ĝi li memoras pri la Budhoj de la pasinteco, aŭ ĉu la heluloj revelaciis ĉion ĉi al li, tiel ke pro tio li memoras?"

La interparolado ankoraŭ sekvis la saman temon, kiam vespere la Beatulo leviĝis de sia meditado. Tial li ree iris al la pavilono en la arbaro, kaj tie sidiĝis sur la tapiŝo preta por li.

"Pri kio vi parolas, fratoj, dum sidas vi ĉi tie, kaj kio estas la temo de la interparolado inter vi?" li demandis; kaj ili informis lin.

"Per klara percepto mi kapablas revoki en la menson tiujn ĉi a ferojn," li respondis, "kaj ankaŭ la heluloj helpis min rememori. Ĉu mi rakontu plu al vi, pri tiuj ĉi pasintaj vivoj?"

"Jes, nun estas taŭga okazo por tion rakonti al ni," ili diris "ni aŭskultos kaj memoros."

LA ALTESTIMATA KOMENCIS :

Mi jam diris al vi pri Vipasio, la altestimata, Arahato, Budho Sublima, nu, la vivhistorio de ĉiu el la Budhoj de la pasinteco konformis al simila disvolviĝo. Ilin, ĉiuj naskis bona kaj virta patrino kaj ilia naskiĝo ĉiam estis okazo por gojo.<sup>1</sup>

Kiam naskiĝis la knabo Vipasio, oni anoncis tion al lia patro, la reĝo Bandhumano, kaj diris, "Moŝto, naskiĝis al vi filo. Ĉu vi volas lin vidi?"

---

<sup>1</sup> La sekvantaj okazaĵoj estas plejparte laŭ la okazaĵoj en la vivo de Gotamo la Budho, kiu rakontas la historion.

Kiam la reĝo vidis la infanon, li ordonis ke oni venigu la antaŭdiristojn, por ke ili profetu lian estontan vivon.

"Ĝoju, Moŝto," ili diris al la reĝo, "ĉar via filo naskiĝis unu el la Potenculoj. Ni vidas, sur lia korpo, la 32 distingaĵojn, kiuj signas ke unu aŭ alia el du gravaj karieroj estos elektebla de li; aŭ li estos potenca reganto de vasta imperio, kaj, venkinte ĉiujn kontraŭulojn, li regos la tutan mondon, ne per skurĝo, ne per glavo, sed per justeco; aŭ li fariĝos Arahato, Budho Sublima, kiu forrulos la vualon por ĉiu en la mondo."

Tiam Bandhumano, la reĝo, ordonis ke oni vestu la antaŭdiristojn per novaj roboj, kaj donacu al ili laŭ iliaj deziroj.

Li dungis vartistinojn por prizorgi la bebon, kies patrino mortis kiam li estis nur septagaĝa. La knabo fariĝis amata de ĉiuj kaj la karulo de la popolo, eĉ kiel bela lotuso blua, aŭ ruĝa aŭ blanka estas kara kaj admirata de ĉiuj, tiel same ĉiu dorlotis lin, fakte prenante lin de sino al sino.

Lia voĉo, kiam li atingis parolpovon, estis bone modulata, dolĉa kaj agrabla, kaj lia rigardo estis klara, brila kaj senpalpebruma, tiei ke oni kriis "*Vipassi, Vipassi, Envidanto, Envidanto!*"<sup>2</sup> kaj tiel li nomiĝis.

Kiam Bandhumano, la reĝo, prezidis ĉe la reĝa juĝejo, li portis la knabon kun si kaj sidigis lin ĉe sia kokso, dum li administris la funkciadon de la leĝoj, konforme al la meritoj de la diversaj kazoj, ĝis vere la knabo, tie sidante ĉe la kokso de la patro kaj koncentrite konsideranta ĉiun kazon, ankaŭ decidis la punktojn de ĉiu afero laŭ justeco. Tiel okazis ke, je la penso "Efektive la bebo estas tiu, kiu juĝas ĝuste la kazojn", pli kaj pli ofte oni lin nomis "*Vipassi, Envidanto.*"

La reĝo igis konstrui por la knabo, kiam li junuliĝis, tri palacojn: unu por la vintro, unu por la somero kaj unu por la sezono de pluvado, kaj li igis ilin ekipiĝi per ĉiuj rimedoj por plaĉi al la kvin sentoj. Vipasio pasigis la kvar monatojn de la sezono de pluvado en la palaco por tiu sezono, servata de aro de muzikistinoj; ne eĉ unu fojon li malsupreniris el la supra teraso por eniri la halon.

Post kelkaj jaroj, kiam Vipasio fariĝis juna viro, okazis ke, en unu tago, li vokis sian ĉariston kaj ordonis pretigi ĉarojn por veturi tra la parkon kaj en la najbaraĵon. Kiam ĉio estis preta, li suriris la ĉaron kaj ekveturis.

Survoje, en la najbaraĵon de la parko, la juna moŝto Vipasio vi dis maljunulon kurban kiel tegmentogablo, kadukan, sin apogantan per bastono, stumblante paŝantan, suferantan kaj jam de longe preta plej-forto. Kiam li vidis lin Vipasio diris, "Tiu homo! bona ĉaristo! Kion li faris por kaŭzi tion, ke liaj haroj ne estas kiel aliaj homoj nek lia korpo kiel tiu de alia?"

"Li estas, kiel oni diras, maljunulo, moŝto."

"Sed kial li tiel nomiĝas?"

"Li estas nomata maljunulo, moŝto, pro tio ke lia vivo alproksimiĝas al ĝia fino."

"Nu, bona ĉaristo, ĉu ankaŭ mi devos maljuniĝi, ĉu mi ne superis la maljuniĝon?"

"Vi, moŝto, kaj ankaŭ ni ĉiuj estas tiaj samspecaj, kiaj devas maljuniĝi, kaj ni ne superis la maljuniĝon."

---

<sup>2</sup> Vipassana estas la envido en la veron, intuicia, tamen la rezulto de preparado per meditado kaj nobla agado.

"Nu, bona ĉaristo, trosatiĝas mia intereso pri la parko por hodiaŭ! Reveturigu min al miaj ĉambroj."

La ĉaristo reveturigis lin, kaj li iris al sia ĉambro kaj sidis mediteme, malĝoja kaj malgaja pensante: "Malgloro estu al tio, kion oni nomas naskiĝo, ĉar la naskito fine montriĝas tia!"

Bandhumano venigis al si la ĉariston, kaj demandis lin, "Ĉu la knabo ĝuis la veturon al la parko, ĉu li plezuriĝis pro ĝi?"

"Ne, mosto, li ne."

"Kion, do, li vidis dum la veturo?"

Kaj la ĉaristo rakontis ĉion al li.

Tiam la reĝo pensis, "Tio ne okazu, ke Vipasio rifuzos regi la landon. Ni ne lasu lin, ke li foriru de la palaco por fariĝi senhejma vaganto. Ni devas evitigi la plenumon de tio, kion parolis la antaŭdiristoj.

Por ke la antaŭdiroj ne plenumiĝu, li aranĝis tiel, ke la junulo estu ĉirkaŭita de pli multaj plezuroj por la sentoj. Kaj tiel Vipasio daŭre vivadis inter mondecaj agrablaĵoj.

Post kelka tempo, la juna reĝido Vipasio diris al sia ĉaristo, ke li prepariĝu kaj ekveturigu lin, kiel li antaŭe faris.

Tiun ĉi fojon, dum la veturo al la parko, li vidis malsanulon, suferantan kaj fartantan tre malbone, malsekan, subtenatan de iuj, flegatan de aliaj. Vidante ĝin, Vipasio demandis: "Tiu homo, bona ĉaristo! kion li faris por kaŭzi tion, ke liaj okuloj ne estas klaraj kiel tiuj de aliaj homoj, nek lia voĉo kiel la voĉoj de aliaj?"

"Li estas, kiel oni diras, malsana, moŝto."

"Sed kio estas la signifo de 'malsana'?"

"Tio signifas, moŝto, ke li apenaŭ povos ree bonfarti pro sia stato."

"Sed, bona ĉaristo, ĉu povas esti ke ankaŭ mi povas malsaniĝi? Ĉu mi ne estas netrafebla de malsano?"

"Vi, moŝto, kaj ambaŭ ni ĉiuj estas tiaj samspecaj, kiuj estas malsaniĝemaj, kiaj ne estas netrafeblaj de malsano."

"Nu, bona ĉaristo, jam trosatiĝas mia intereso pri la parko hodiaŭ! Reveturigu min al miaj ĉambroj."

La ĉaristo reveturigis lin, kaj li iris al sia ĉambro kaj sidis mediteme, malĝoja kaj malgaja. Kiel antaŭe, Bandhumano la reĝo venigis al si la ĉariston, kaj demandis lin: "Ĉu la knabo ĝuis la veturon al la parko, ĉu li plezuriĝis pri ĝi?" Kaj la ĉaristo respondis kiel antaŭe kaj priskribis tion, kio okazis.

Tiam la reĝo ankoraŭ pensis, tio ne okazu, ke Vipasio rifuzos regi la landon. Ni ne lasu lin, ke li foriru de la palaco por fariĝi senhejma vaganto. Ni devas evitigi la plenumon de tio, kion parolis la antaŭdiristoj.

Por ke la antaŭdiroj ne plenumiĝu, li eĉ plie aranĝis tiel, ke la junulo estu ĉirkaŭita de pli multaj plezuroj por la sentoj. Kaj tiel Vipasio ankoraŭ vivadis inter mondecaj agrablaĵoj. Denove, post kelka tempo, la reĝido Vipasio ekveturis por viziti la parkon, kaj survoje li vidis amason da homoj, vestitaj en diverskoloraj vestaĵoj kaj konstruantaj brulstakon, Vidante ilin, li de mandis la ĉariston: "Kial kunveniĝas tia amaso da homoj diverskoloro vestitaj, kaj konstruantaj tiun brulstakon?"

"Tio estas, moŝto, pro tio, ke iu venis al la fino de sia vivo."

"Do, veturigu la ĉaron proksimen al tiu, kiu venis al la fino de sia vivo", li ordonis.

Kiam la ĉaristo tion faris, Vipasio vidis la kadavron de tiu, kiu mortis, kaj li demandis: "Kion signifas tio, bona ĉaristo, ke oni venas al la fino de la vivo?"

"Ĝi signifas, moŝto, ke nek patrino, nek patro, nek parencoj nek aliaj iam vidos lin plu, nek vidos li ilin plu; li estas mortinta."

"Sed, ĉu ankaŭ mi devas morti; ĉu mi ne superis la morton? Ĉu nek la reĝo, mia patro, nek la reĝino, nek aliaj parencoj miaj vidos min plu, kaj neniam plu mi ilin vidos?"

"Vi, moŝto, kaj ankaŭ ni, ĉiuj estas mortontaj, ni ne superis la morton. Vi neniam plu estos vidata, kaj neniam plu vidos vian patron aŭ parencojn."

"Do, bona ĉaristo, jam trosatiĝas mi pri la parko hodiaŭ. Reveturigu min al miaj ĉambroj."

La ĉaristo reveturigis lin, kaj li iris al sia ĉambro kaj sidis mediteme, malĝoja kaj nalgaja pensante: "Malglora estu al tio, kion oni nomas naskiĝo, ĉar al tiu, kiu naskiĝas venas velkiĝo, venas malsano, venas tiel kadukiĝo kaj morto."

Tiam Bandhumano demandis la ĉariston denove, kaj ricevis respondon kiel antaŭe, kaj kiel antaŭe, li igis plifortigi la sensajn distraĵojn kiuj ĉirkaŭis Vipasion. Post ankoraŭ kelka tempo Vipasio ree ekveturis kun sia ĉaristo, kaj en tiu ĉi okazo li vidis vaganton, kun razita verto kaj vestita en flava robo, kaj li demandis la ĉariston kial la kapo kaj la vesto de tiu ĉi homo diferencis de tiuj de aliaj.

"Tiu ĉi viro, moŝto, estas vaganta religiulo, tiel nomata ĉar li dediĉas sin entute al religia vivo en sereneco, en bonfarado, meritinda konduto, sen malutilo sed en bonvolo al ĉiuj estaĵoj."

"Ho, kiel bonege, kara ĉaristo!" ekkriis Vipasio, "ni alproksimiĝu al li." Kaj kiam la ĉaro ĝisatingis la vaganton, li interparolis kun li. Li sciigis, ke tio, kion diris la ĉaristo pri li estis vera. Sen prokrasto li forlasis sian palacan vivon, sin vestis per flava robo kaj fortranĉis la hararon.

Tiam okazis ke, ĉe Bandhumatio, la ĉefurbo de la reĝo, ĉirkaŭ 84.000 enloĝantoj tiel admiregis la reĝidon Vipasion en ĉio, kion li faris, ke ili ankaŭ sin vestis en flavaj roboj kaj razigis al si la vereton, sed Vipasio bone sciis ke ne taŭgis por lia celo, ke li estu ĉirkaŭpremita de tia homamaso, kaj li sin apartigis de ili por mediti en soleco.

"En la mondo ĉie estas ĉagreno", li pensis. "Oni naskiĝas, maljuniĝas kaj mortas. Neniu scias rimedon por eskapi de suferado, por eskapi kadukiĝon kaj morton."

"Kio estas la kaŭzo de kadukiĝo kaj morto?" li sin demandis, kaj, el la pripensado pri la kaŭzo estiĝis en li, pro racia konsidero, la konvinko: " kie estas naskiĝo, tie estas kadukiĝo kaj morto."

Kaj, tiel, ankoraŭ pripensante kaŭzon, la konvinko estiĝis en li, pro racia konsidero, ke la kaŭzo de naskiĝo estas fariĝo, fariĝon kaŭzas deziro, deziron kaŭzas avido, avidon kaŭzas sentoj, sentojn kaŭzas kontakto, kontakto okazas per la ses terenoj de la sentorganoj<sup>3</sup>, la ses terenojn de la sentorganoj kaŭzas psikokorpeco, psikokorpecon kaŭzas percepto

Kaj al Vipasio, la Bodhiulo, venis la penso: "La percepto returnas ĉe psikokorpeco; preter tio ĝi ne pasas. Nur kiel sekvas povas okazi, ke oni naskiĝu, kadukigu kaj mortu, tio estas: percepto rezultas el psikokorpeco kaj psikokorpeco el percepto, la ses terenoj de la sentorganoj rezultas el psikokorpeco, kontakto estiĝas pro la ses terenoj de la sentorganoj,

---

<sup>3</sup> la ses terenoj de la sentorganoj = la menso estas la sesa.

sentoj rezultas el kontakto, avido rezultas el sentoj, deziro rezultas el avido, fariĝo el deziro kaj naskiĝo rezultas el fariĝo, kaj rezultas kadukiĝo kaj morto el naskiĝo, kaj tiel ankaŭ rezultas malfeliĉo, priplorado, sufero, malĝojo kaj malespero. Tiel estiĝas tiu ĉi tutaĵo de malbono.

"Estiĝo, estiĝo!" je tiu penso venis al Vipasio ekvido regionojn ĝis tiam neniam penetritajn de la menso, kaj estiĝis en li scio, racio, saĝeco kaj luminiĝo.

"Pro la foresto de kio, ankaŭ forestas kadukiĝo kaj morto? Pro la ĉeso de kio, ankaŭ kadukiĝo kaj morto ĉesas?" El la pripensado pri la kaŭzo estiĝis en li, pro racia konsidero, la konvinko: "Kiam naskiĝo ĉesas, kadukiĝo kaj morto ĉesas; kiam fariĝo ĉesas, naskiĝo ĉesas; kiam deziro ĉesas, fariĝo ĉesas; kiam avido ĉesas, deziro ĉesas; kiam sento ĉesas, avido ĉesas; kiam kontakto ĉesas, sentoj ĉesas; kiam la ses tereroj de la sentorganoj ĉesas, kontakto ĉesas; kiam psikokorpeco ĉesas, la ses terenoj de la sentorganoj ĉesas; kiam percepto ĉesas, psikokorpeco ĉesas; kiam psikokorpeco ĉesas, percepto ĉesas."

"Jam! Mi gajnis la vojon al luminiĝo per envido. Jen ĝi estas: pro la ĉeso de psikokorpeco, percepto ĉesas, kaj inverse; kaj pro la ĉeso de psikokorpeco, la ses terenoj ĉesas, kaj tiel plu ĝis, pro la ĉeso de fariĝo, naskiĝo ĉesas; kaj pro la ĉeso de naskiĝo, ĉesas kadukiĝo kaj morto, malfeliĉo, priplorado, sufero, malĝojo kaj malespero. Tiel ĉesas tiu ĉi tutaĵo de malbono."

"Jam ĉeso! Jam ĉeso!" kaj Vipasio en meditado perceptis la estiĝon kaj ĉeson de la kvin grupoj de komponaĵoj, kiuj dependas de deziro: "Tia estas formo, sento, percepto, mensa efektiviĝo kaj konscio, kaj tiel estas la forpaso de formo, sento, percepto, mensa efektiviĝo kaj konscio."

Tiel por li, perceptante en meditado la estiĝon kaj forpason de la kvin grupoj de komponaĵoj, kiuj dependas de deziro, post ne longe atingiĝis tio, ke lia koro liberiĝis de la asavo<sup>4</sup>.

Tiam la penso venis al la Budho Vipasio: "Tiu ĉi vero trankvila kaj sublima, en kiun mi penetris, estas profunda kaj malfacile konceptebla kaj elkomprenbla. La homoj de tiu ĉi mondo dediĉas sin nur al plezuroj, al kiuj ili alkroĉiĝas. Se mi provus instrui ilin pri tiu ĉi vero, mi vane elspezus la penon." Tiam la Granda Braĥmo eksciis la penson de Vipasio, kaj petegis lin, ke li prediku ĉi tiun veron: "Estas tiuj, kies okuloj estas apenaŭ malklarigitaj de polvo, kiuj perdiĝus se ili ne aŭdus la veron; ili fariĝos komprenantoj de la vero."

Tiel same kiel troviĝas en iu lago lotusoj bluaj aŭ ruĝaj aŭ blankaj, kaj iuj plantoj enradikiĝintaj en la fundo de la akvo, kreskas en la akvo, ne supreniĝas el ĝi, sed prosperas subakve; kaj aliaj plantoj enradikiĝintaj en la fundo de la akvo, atingas la supraĵon; kaj aliaj plantoj kreskas el la fundo, tra la akvo, sin rektigas super la akvon kaj staras seka kaj libera de ĝi; tiel la Budho Vipasio kun saĝegeco rigardis la mondon kaj vidis tie homojn kun okuloj preskaŭ liberaj de polvo, kaj homojn kies okulojn grave malklarigas multe da polvo, homojn lertajn kaj homojn mallertajn, homojn bonintencajn kaj malbonintencajn, sinregantajn kaj nesinregantajn, inter ili kelkajn komprenantajn la danĝerojn de malbonfarado.

Tiam, responde al la petego de la Granda Braĥmo, Vipasio diris: "Malfermita estas la pordego de la sekura vojo al Nirvano! Tiuj, kiuj aŭdas, malkonfesu siajn falsajn kredojn!

---

<sup>4</sup> asavo = ebrieca aŭ nebula stato de la menso; la kvar asavo estas: volupto, avido al la vivo, iluzio kaj nescio.

Mi malesperis pri la peza tasko, ho Brahmo, kaj ne alparolis la homojn pri tiu ĉi doktrino dolĉa kaj bona. Sed nun, al kiuj mi unue prediku la Veron? Kiuj facile komprenos tiun ĉi doktrinon?"

Li ekpensis pri princo nomita Kahando kaj homo nomita Tisso, la filo de pastro; ambaŭ loĝis ĉe Bandhumatio: " Ili estas kleraj, larĝspiritaj kaj saĝaj; se mi instruos al tiuj la veron, ili facile komprenos ĝin."

Do li iris al la parko de cervoj ĉe Bandhumatio, kaj, responde al mesaĝo, kiun li sendis al Kahando kaj Tisso, ili kunveniĝis kun li tie.

Vipasio unue parolis al ili pri malavareco kaj bonkonduco, kaj, kiam li konstatis, ke ili estis atentemaj, li proklamis la veron, kiun nur la Budhoj gajnas, tio estas: la doktrino pri sufero, la origino de sufero, la ĉeso de sufero, kaj la vojo al sensuferiĝo. Tiel same kiel pura tuko, el kiu oni jam forlavis ĉiujn makulojn, facile koloriĝas de tinkturo, tiel Kahando kaj Tisso, eĉ dum ili tie sidis, akiris klaran ekvidon de la Vero, kaj ili sciis: " Ĉio ajn, kio havas komencon, en tio ankaŭ estas esence la nepreco de forpaso."

Kiam la loĝantoj de Bandhumatio sciigis pri tio, ke Kahando kaj Tisso aŭskultis la instruon de Vipasio pri la Vero, kaj decidis vivadi ekde nun konstante en konformeco al la doktrino, ili iris amase al la parko de cervoj por aŭdi la predikon de la Budho.

Tiam Vipasio instruis, admonis, instigis kaj gojigis ilin per religia prelegado, klarigante pri la danĝereco, vaneco kaj putrigemo de komponitaĵoj, kaj la avantaĝoj de Nirvana. Post nelonge, iliaj koroj estis senigitaj de avido, kaj ili liberigis de la asavoj.

Post kelka tempo la nombro de la disĉiploj, kiuj estis en la parko de la cervoj estis tre granda, kaj Vipasio pensis, ke plej bone estus se ili disirus en la mondon por prediki la doktrinon.

"Mi permesas al vi," li diris al la fratoj, "ke vi iru kiel komisiitoj por la bono kaj feliĉo de multaj personoj, pro kompato al la mondo, por alporti profiton, bonon kaj feliĉon al ĉiuj homoj. Iru ne sole, sed duope. Instruula Veron, belan de la komenco, en la progreso kaj en la plenumiĝo, laŭ la spirito kaj laŭvorte; proklamu la altan vivadon en la perfekteco kaj pureco. Troviĝas homoj, kies okuloj apenaŭ malklariĝas pro polvo, kiuj perdiĝas ĉar ili ne aŭdas la veron. Ankaŭ, fratoj, vi revenu ĉi tien al Bandhumatio en ĉiu sesa jaro, por renovigi vian scion de la principoj."

Tiel okazis, ke en ĉiu sesa jaro la disĉiploj rekunvenis ĉe Bandhumatio kaj ripetis la principojn kiuj kondukas al memregado, nome: esti pacienca kaj tolerema, celi Nirvanon kiel plej altan gajnon, ne faru malutilon al alia homo -- tiu ne estas disĉiploj, kiu vundas naj baron. Ne faru malbonon; vin dediĉu al bono; purigu viajn korojn -- tiu ĉi estas la admono de la Budhoj. Ne akuzu alian, ne batu alian, regu vin mem. Manĝu sobrece; ripozu kaj dormu en soleco; emadu al pensoj sublimaj -- tiu ĉi estas la admono de la Budhoj.

Eĉ verŝfalo de oro ne kontentigus avidon. La saĝulo bone scias, ke avido estas nesatigebla kaj ĝi kaŭzas suferon.

(fino)